



# Jura Semajno

Semajna bulteno de Internacia Jurista Esperanto-Asocio

Aprilo : 4 2022

## KALIFORNIA TRIBUNALO DECIDOS PRI PENTRAĴO RABITA DE LA NAZIOJ

La Usona Supera Kortumo ĵus sciigis sian unuaniman verdikton favore al la membroj de la familio *Cassirer*, kiuj estis la posedantoj ĝis la jaro 1939, de la pentraĵo “*Rue Saint-Honoré, dans l’après-midi. Effet de pluie*” (1897), de la franca pentristo *Camille Pissarro*.

La pentraĵo estis aĉetita en tiu sama jaro de la germana negocisto *Julius Cassirer*. Nuntempe, la verko troviĝas ĉe la Muzeo *Thyssen-Bornemisza* en Madrido (Hispanio).

En la jaro 1939, *Lilly Cassirer* malprofite vendis, kontraŭ nur 360 dolaroj, tiun valoran pentraĵon kaj tiel ŝi sukcese forlasis Germanion. Verdire, ŝi eĉ ne ricevis tiun monon, pro la fakto, ke la naziaj aŭtoritatoj blokis ŝian banko-konton. Post la dua mondmilito la pentraĵo malaperis, tamen la registaro de la Federala Germana Respubliko agnoskis, ke la familio *Cassirer* estis la laŭleĝa proprietulo de la pentraĵo kaj, kiel reparacion, *Lilly Cassirer* ricevis 120.000 germanajn markojn.



*Rue Saint-Honoré, dans l’après-midi. Effet de pluie*” de *Camille Pissarro*.

En la jaro 1976, la barono *Von Thyssen-Bornesmisza* aĉetis, bonfide, la pentraĵon, li pagis 360.000 dolarojn al novjorka galerio. Poste, en 1993 la hispana ŝtato aĉetis la verkon, kune kun aliaj 775, al la germana nobelo kaj oni ekspoziciis ilin ĉe la Muzeo *Thyssen-Bornemisza* en Madrido.

*Claude Cassirer*, nepo de *Lilly*, sciis pri la ekzisto de la pentraĵo, do, li argumentis antaŭ la hispana ŝtato cele la rekuperon de la pentraĵo, kiu verdire estis rabita de la nazioj.

*Claude Cassirer* decidis pledi antaŭ tribunalo por havigi denove la pentraĵon al sia familio. Tamen, la unua grava afero estis decidi kiu jurisdikcio devus pristudi la aferon. *Cassirer* prezentis pledon antaŭ jura instanco de Kalifornio, la usona ŝtato kie li loĝis. Male, Hispanio argumentis, ke la aplikebla leĝo devus esti tiu hispana, pro la fakto, ke la pentraĵo troviĝas tie.

La afero pri la apikebla leĝo estas tre grava en ĉi tiu kazo, ĉar laŭ la hispanaj leĝoj, publika kaj ne-diskutebla posedo de la pentraĵo dum pli ol ses jaroj, sufiĉas por konsideri la muzeon kiel laŭleĝan posedanton. Kontraŭe, la kaliforniaj leĝoj proklamas, ke ne povas ekzisti laŭleĝa posedanto se iu perdis posedon en tiaj cirkonstancoj.

Nun, la Usona Supera Kortumo decidis en sia verdikto, ke la afero devus esti decidata de kalifornia tribunalo.

Do, la proceso nun retrovenos en kalifornian juran instancon. *David Cassirer*, pranepo de *Lilly*, deklaris, ke jen bona mesaĝo al muzeoj, ĉar ili ne rajtas amasigi pentraĵojn antaŭe prirabitaj de la nazioj sub teruraj cirkonstancoj.



Muzeo *Thyssen-Bornemisza* en Madrido (Hispanio).

## **GRAVA INFORMO POR MEMBROJ AŬ SIMPATIANTOJ DE IJEA, KIUJ PROFESIE AGADAS KIEL ADVOKATOJ.**

Dum la venonta Universala Kongreso de Montrealo, oni informos pri la baldaŭna fondiĝo de **UIAE -Unio Internacia de Advokatoj Esperantlingvaj-**. Temas pri nova asocio kie renkontiĝos ĉiuj advokatoj kiuj parolas aŭ simpatias la internacian lingvon.

Ne temas pri konkuranta asocio kun nia IJEA, pro la fakto ke IJEA rilatas al juristoj, el ĝenerala vidpunkto, ne nur al tiuj kiuj profesie agadas ĉe juĝaj instancoj kiel advokatoj. Kompreneble, ambaŭ asocioj kunlaboros kiel eble plej efike.

**Pliaj informoj pri UIAE ĉe [uiaeesperanto@gmail.com](mailto:uiaeesperanto@gmail.com)**

## FORRABITAJ ARTAĴOJ DUM LA DUA MONDMILITO

Antaŭ kaj dum la dua mondmilito, forrabadoj kaj detruoj de artaj verkoj amase okazis. La prirabado komenciĝis en Aŭstrio. Tie, oni rajtigis al 80.000 judoj eliri el tiu centr-eŭropa lando, kondiĉe ke ili devis cedi siajn plej valorajn havaĵojn al la Oficejo pri Juda Elmigro, starigita de Adolf Eichmann en la jaro 1938 por favorigi la foriron de judoj. Do, judoj kiuj posedis artaĵojn kaj deziris savi siajn vivojn *donacis* tiujn altvaloraĵojn kaj tiel ili rajtis elmigri. Ĉi tiuj objektoj amasiĝis en la Muzeo *Kunsthistorisches* de Vieno.



Fine de la milito la usona armeo kreis specialan grupon por trovi forrabitajn artaĵojn.

La forrabado poste daŭriĝis en Ĉekio kaj en Pollando, tie oni konfiskis ne nur privatajn kolektojn sed ankaŭ publikajn. Post la invado de Sovetunio, nazioj kreis specialan grupon “*Einstzgruppen*” por prirabadi ĉiujn kulturajn valoraĵojn kiel eble plej efike. En la okupita Francio oni konfiskis pli ol 200 artajn kolektojn, plej multaj el ili apartenis al jud-devenaj familioj. En la jaro 1940, *Otto Rummel*, direktoro de la naciaj germanaj muzeoj, ellaboris dosieron kiu enhavis ĉiujn artaĵojn *ricevitajn*. Tiu dokumento utilis, post la milito, por rehavigi pli ol 1.800 artaĵojn al antaŭaj proprietuloj.

Por apogi leĝe ĉi tiun disrabadon, unu el la ĉefaj respondeculoj de la *Eisantzstab Reichsleiter Rosenberg* (ERR), speciala nazia grupo por la konfisko de artaĵoj, asertis, ke judoj akumulis riĉon dum multaj jarcentoj, kaj tio malebligis al la germana popolo disponi pri sia propra parto de la kulturaj kaj ekonomiaj resursoj de la mondo. Laŭ tio, la konfiskado de altvaloraj artaĵoj apartenantaj al judoj povus esti rigardata kiel malgranda mon-kompenso.

En Francio kelkaj generaloj de la germana armeo, kiu vere ne simpatiis al nazia partio, opoziciis al tiu forrabado, ĉar ĝi estis tute malpermesita de la Konvencio de *Hago* subskribita en la jaro 1907. Tamen, Hitler mem rajtigis al ERR konfiski kaj transporti en Germanion 4.174 skatolojn plenaj je artaĵoj, kiujn poste nazioj akumulis en kasteloj kaj monaĥejoj de Germanio, Ĉeĥio kaj Aŭstrio. La registaro de *Vichy*, francaj kunlaborantoj kun la germanaj okupantoj, protestis kontraŭ ĉi tiu forrabado.

Fine de la dua mondmilito, la Statuto de la Nuremberga Tribunalo konsideris krimon kontraŭ la homaron la forrabadon de artaĵoj. Oni kalkulis, ke dum tiu milito pli ol 600.000 verkoj estis fororbitaj de la nazioj: 200.000 en Germanio kaj Aŭstrio; 100.000 en okcidenta Eŭropo kaj 300.000 en orienta Eŭropo. El ĉiuj ili, ankoraŭ 10.000 ne estas rehavigitaj al laŭleĝaj proprietuloj. La Deklaracio de Vaŝingtono, subskribita en la jaro 1998, fiksas regulojn kaj normojn por lokalizi tiujn artaĵojn kaj revenigi ilin al antaŭaj proprietuloj aŭ al ties heredintoj.

## *Vorto de la Semajno*

**Aprobi** (tr): Opinii kaj deklari bona kaj akceptinda.  
Deklari oficiale taŭga por difinita funkcio aŭ uzo.

**Aprobo:** Ago kaj vortoj de tiu, kiu aprobas.

**Unuanime aprobi:** Aprobi sen malkonsentoj, kiam la deklaro estas farita de kelkaj homoj.

Sinonimoj: *konsenti, tralasi, laŭdi.*

*La Parlamento aprobis novan leĝon pri edukado.*

*La Akademio malaprobis la uzon de tiu nova vorto.*

